

KONTAKTO

numero 147 (1995:3)

- Kio veras kaj kio ne?
MITOJ KAJ FAKTOJ PRI SERPENTOJ
- Gajnu premiojn solvante niajn ORGANIZAJN PROBLEMOJN
- Vizitu afrikan samideanon en lia KAMPARA HEJMO

UN



50-jara

Serpentoj: faktoj kaj mitoj	Remigiusz Mielcarek, Kanado	2
Arbohakisto kaj dancanta tigro	Choe Taesok, Koreio	3
UN 50-jara	Ralph Harry, Aŭstralio	4
Anonctabulo		8
Organizaj problemoj (konkurso)	Anna Löwenstein, Italio	8
Urbo, kiu tri-foje ŝanĝis sian nomon	Irina Aleksejeva, Rusio	9
Labortago en mia vivo	Chan Sook Wai, Malajzio	10
La bona ingo		10
Vizito al mia kampara hejmo	Sanu Adepoju, Niĝerio	11
Kial la kuljoj sangosuĉas?	Kizeyidioko Mayinda, Zairio	11
Ujĉioj	Atiljo Orellana Rojas, Argentino	12
Raportante pri tabuo	Diversaj aŭtoroj	13
Malvantulo	Olli, Finnlando; trad. Ilkka Santtila	14
Pensoj en la kelo	István Örkény, Hungario; trad. István Ertl	14
Tentaklo		15
La edzino de Ĝiĝo	trad. Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo	15
La panjo de la mumintrolajo	Franĉjo Veuthey, Nederlando	15
Gaja futbalo	Maša Kočetkova, Rusio	16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA) Fondita en 1963

N-ro 147 (1995:3), 32-a jarkolekto
ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
☎ +31 10 436 10 44;
☎ fakso +31 10 436 17 51
e-poŝto: uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)
Felip Artero i Lozano (Katalunio)
Martin Burkert (Germanio)
Zoran Ćirić (Serbio)
Alberto García Fumero (Kubo)
Bernard Golden (Hungario)
Claus Günkel (Germanio)
Georgo Kamaĉo (Hispanio)
Ludmila kaj Piotr Malicy (Pollando)
Remigiusz Mielcarek (Kanado)
Atiljo Orellana Rojas (Argentino)
Osho-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)
Ánna Rachoń (Pollando)
Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)
Ilkka Santtila (Finnlando)
Sabira Ståhlberg (Germanio)
Jozef Truong (Usono)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facillingvaj artikoloj estas verkitaĵoj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifo:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakviriĵaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.



enkonduko

Mi volis stampi en la paĝoj de KONTAKTO nian saluton al la 50-jariĝo de UN kunmetante vere universalan numeron — kio ŝajne sukcesis! Eĉ el la araba mondo kaj Oceanio, mondopartoj tradicie forestantaj de niaj paĝoj, venis kontribuadoj al tiu ĉi numero, kiu estas vestita en la bluo de UN.

Eble vi jam rimarkis, ke lastatempe KONTAKTO plidensiĝis. Tio ne estas merito mia, sed via, kiu sendadas artikolojn. Fakte, mi estas sufiĉe kontenta pri la fluo de materialo, ne nur laŭ kvanto sed ankaŭ laŭ kvalito. Mankas tamen veraj artikoloj facillingvaj — espereble tiu situacio ŝanĝiĝos en la daŭro de tiu ĉi jaro.

Ni adiaŭas la italajn ŝercrakontojn esperantigitajn de Cláudio Rodrigues Pistilli el Brazilo, kaj ankaŭ la babilajojn de Olli, kiuj venis el la traduka plumo de Ilkka Santtila, el Finnlando. Al ili ambaŭ — dankon!

Franĉjo

sciujo
“Kaj Dio la Eternulo diris al la serpento: Ĉar vi tion faris, tial estu malbenita inter ĉiuj brutoj kaj inter ĉiuj bestoj de la kampo; sur via ventro vi irados kaj teron vi manĝados dum via tuta vivo. Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon” (Genezo, 3: 14-15).


En la kristana kulturo, al kiu mi apartenas kaj kun kiu mi identiĝas, oni rigardas serpenton kiel simbolon de satano. Serpento — la malbenita besto. Kvankam aliflanke la simbolo de kaliko kun serpento indikas la farmacion, do ĉiukaze institucion, kiu povas helpi nian sanon (almenaŭ en teorio). Tiel aŭ alie bedaŭrinde en nia imago serpento restas kiel simbolo de io malbona kaj tre danĝera. Mi okupiĝis duonprofesie pri serpentoj transportante, tenante en mia hejmo kaj observante ilin en la naturo — do mi havas tute alian opinion pri ili.

En la mondo vivas ĉirkaŭ 2 700 specioj de serpentoj. El tiu ĉi nombro nur 1/6 estas venenaj. Ne-venenaj serpentoj ne prezentas por la homo ian minacon krom kelkaj specioj de la grupo plej primitiva, laŭ evoluisma senco — nome la sufokserpentoj. Kompreneble, ankaŭ la plejmulto el ili neniel povas atenci kontraŭ la homo. Danĝeraj povas esti la sufoka boao, reta pitono kaj anakondo.

La reta pitono estas la plej longa serpento, kiu povas atingi 11 metrojn (maksimume 11,8 m). Oni raportis ĉefe el Hindio pri atakoj kaj eĉ formango de infanoj fare de tiu ĉi serpento. Generale por plenkreskuloj la danĝero de boao, anakondo kaj pitono povas aperi, kiam oni tenas ilin hejme. Ludante kun grandaj serpentoj oni povas esti atakata kaj eĉ sufokata — se oni havas nesufiĉan sperton. Ĉiukaze, kvankam la danĝero estas malgranda, oni devas esti singarda. Certe multe pli fatalaj estas simpatie aspektantaj ursoj aŭ eĉ sovaĝaj hundoj.

Ni revenu al la venenaj serpentoj. Ĉi tie oni nepre devas substreki la fakton, ke tiuj ĉi serpentoj ne atakas homon por lin manĝi — tio ne eblas. Ili atakas nur se ili sentas minacon, nur por sin defendi. Normale ili uzas la venenon por mortigi pli malgrandajn bestojn por manĝo. Estas du grupoj de venenaj serpentoj. La unua havas venenajn dentojn malantaŭe nur por mortigi la manĝatan viktimon, kiu eniris jam sufiĉe profunde en la serpentan buŝon, ĉar la moviganta viktimo povus damaĝi la inteston de la serpento. Tiuj ĉi serpentoj, al kiuj apartenas la fama afrika boomslang, ne prezentas por ni ian ajn danĝeron — krom se ni intencas meti nian fingron profunde en ĝian gorĝon. La veneno de tiuj ĉi serpentoj estas tre forta kaj oni ne produktas kontraŭ ĝi ian antidoton, ĉar meti fingron profunde en la serpentan buŝon povas fari nur frenezulo aŭ memmortiganto.

La lango estas ĉio por serpentoj: ne nur armilo, sed la ĉefa sentilo. La skamoj malebligas scii pri la ekstera temperaturo, al kiu ili devas adaptadi la propran por ne morti. Serpentoj estas preskaŭ surdaj kaj malmulte vidas: la lango “informas” pri sonoj kaj movoj de la ĉirkaŭaĵo.



mitoj:

aj mitoj

Mielcarek, Kanado

Ce egiptoj kobraj protektis la faraonojn sur iliaj oraj maskoj. De la grekoj ni heredis la simbolon de eterna vivo, nome ringon konsistantan el serpento manĝanta al si la voston. Ketzalkoahtio, azteka diaĵo, estas plumohava serpento (ĉi-sube bildo de krotalo en Teotihuakano, Meksiko).

Hodiaŭ serpento estas ligata al kuracarto. Ĉi-supre, la simbolo de Universala Medicina Esperanto-Asocio.



Tiu ĉi stratafiŝo en Argentino informas, kiel distingi inter vipuroj (venenaj serpentoj) kaj kolubroj (senvenenaj). Jen la ĉefaj donitaĵoj:

Vipuroj (= venenaj)	Kolubroj (= senvenenaj)
triangula kapo	rondeca kapo
pupilo vertikala	pupilo ĝenerale ronda
karenitaj skamoj	plataj skamoj

Se vi renkontas iun serpenton, ne tuŝu ĝin, ne ĝenu ĝin, simple foriru. Certe ĝi reciproke ne ĝenos vin. Ne mortigu ĝin, se ne vere necesas. Mi observis serpentojn en la naturo — ili ĉiam savis sin per forkuro. Lasu la serpentojn vivi. La akcidentoj fakte okazas pro homa neatentemo, ne pro besta agresemo. Ni estu nur pli atentemaj. Tio vere helpos eviti diversajn malagrablaĵojn. □

La alia grupo, al kiu apartenas kobroj, vipuroj kaj ankaŭ krotaloj, posedas venenajn dentojn en la antaŭa parto de la buŝo. La dentoj estas diverse konstruitaj. Ĉe kobroj ili estas tre primitivaj, tre malgrandaj, ekzemple ĉe la hinda kobro ili atingas nur 3 milimetrajn kaj havas eksteran malfermitan kanaleton tra kiu gutas la veneno. La plej evoluintaj venenaj serpentoj, nome vipuroj kaj krotaloj, posedas grandajn dentojn, kiuj povas moviĝi. Do, kiam la serpento fermas sian buŝon la du venenaj dentoj kliniĝas.

La dentoj posedas ere kanalon tra kiu dum atako fluas la veneno. La plej "danĝeraj" venenaj serpentoj (almenaŭ pro sia grandeco) estas la reĝa kobro de Azio, tajpano de Aŭstralio kaj la muta krotalo en tropika Ameriko. Ili povas atingi preskaŭ 5 metrojn kaj posedas forlegan venenon. Sed ne ili influas la tragikan statistikon. En Hindio 10 000 homoj jare mortas post serpentopiko. Preskaŭ ĉiuj estas viktimoj de nur du specioj: la ĉena vipuro kaj la hinda kobro. Tiuj ĉi serpentoj plej ŝatas vivi ĉe la homaj konstruaĵoj, tiel ke ĉefe en vilaĝoj, kie la nudpiedaj hindoj libere marŝas, ili povas facile fariĝi viktimo de murdopiko. La menciitaj rampuloj ofte eniras domojn serĉante ratojn kaj musojn.

Ni ne persekutu la serpentojn. Sciu, ke multaj el ili formiĝas damaĝajn ronĝulojn en niaj kampoj kaj domoj. Ili havas sian propran lokon en la ekologia ĉeno.

popole

Arbohakisto kaj dancanta tigo



Antaŭ multaj jaroj vivis arbohakisto, kiu ĉiam kunportis bambufluton kien ajn li iris. Li kutimis fluti dum laborpaŭzo, dum irado al kaj de la hejmo, aŭ kiam ajn li havis liberan momenton. Infanoj kolektiĝis ĉe li kaj laŭ lia muziko ili kantis kaj dancis. Eĉ birdoj aspektis ĉarmitaj de lia flutado.

Lun tagon la arbohakisto eniris en profundan arbaron por haki arbojn. Lin surprizis subita susurado. Li alrigardis kaj ĝuste tiam trovis grandan tigron venanta al li. En rapidego li surgrimpis la plej proksiman arbon.

La tigo ekgrimpis la arbon por kapti lin, sed la arbotrunko estis tro glita por ke ĝi povu sukcesi. Ĝi provis kaj provis, sed ĉiufoje falis. Ĝi fine sidis ĉe la arba malsupro dum iom da tempo kaj poste longpaŝe interniĝis en la arbaro.

La arbohakisto ĝojspiregis pro liberiĝo, sed liaj gamboj estis tiom tremaj, ke li ne povis malsupreniĝi. Sed ĝuste, kiam li sentis sin sufiĉe trankvila por reprovi, ses trigroj aperis ĉe la malsupro de la arbo.

La arbohakisto rigardis suben kun hororo, kiam ili ekgrimpis unu sur alian por lin atingi. "Ŝajnas, ke proksimiĝas al mi sorto de morto. Mi distriĝu lastafoje", li diris al si kun senespero, kaj eliris sian fluton. "Tititu! Tutitu...!" li ekflutis.

Bonsance por la arbohakisto, la plej malsupra tigo antaŭ nelonge formaniĝis ŝamanon, kaj sekve ekdancis laŭ la flutado de la arbohakisto. Ĉar samanoj kutime dancas, kiam ili aŭdas muzikon. Tio malfaciligis al la aliaj trigroj ekvilibri.

Kun laŭta bruo la plej supra tigo falis sur la rokan teron. Tamen la plej malsupra tigo daŭrigis sian dancadon. Unu post alia ili ĉiuj surfalis kaj surtere kuŝis senkonsciaj, krom la dancanta tigo. Vidante tion, la arbohakisto flutis eĉ pli fervore, ĝis la tigo ĉirkaŭdancis kvazaŭ freneze. Malrapide la arbohakisto desupris kaj ŝtele forkuris en la arbaron.

El la korea popolrakontaro, Choe Taesok, Koreio

ATENTON, MALFORTVIDANTOJ!

Vi povas senpage ricevi **KONTAKTO** voĉlegitan. Necesas nur sendi du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



3
n-ro 147 (1995:3)
KONTAKTO

La 24-an de oktobro 1945, post terura mondmilito, oni celebris la naskiĝon de nova tutmonda organizaĵo, "Unuiĝintaj Nacioj". Nun, en periodo de foresto de ĝenerala milito sed kun multaj lokaj kaj regionaj konfliktoj, la juna generacio rajtas demandi: "Ĉu la historio de la 50-jariĝanta organizaĵo donas al ni esperon, ke estos vere nova mondordo en la 21-a jarcento?"

La Ligo de Nacioj

Post la Unua Mondmilito, kiu daŭris de 1914 ĝis 1918, estis starigita la Ligo de Nacioj, la unua internacia organizaĵo "por faciligi la internacian kunlaboron kaj havigi al la nacioj pacon kaj sekurecon".

Estis nur 32 membroj, inkluzive la memregajn dominiojn de la Brita Imperio, listigitajn sub Granda Britio. La Kunsidantaro (Asembleo) elektis 4 membrojn de la Konsilantaro, en kiu Britio, Francio, Italio kaj Japanio estis konstantaj membroj.

Kiel knaboj ni aŭskultis paroladojn pri la nobla tasko de la Ligo, kaj fariĝis membroj de la Asocio, kiu subtenis ĝin, kvazaŭ admirantaro. Ni estis ankaŭ anoj de Societo de Junuloj por la Ruĝa Kruco, en kiu ni grupe interŝanĝis kun junuloj el aliaj landoj informdosierojn pri Tasmanio. Ni lernis en la lernejo pri la Internacia Labororganizaĵo, kies rolo estis antaŭenigi kunlaboradon pri la kondiĉoj de laboristoj en la fabrikoj de ĉiuj landoj. Ni legis ĝian bultenon en Esperanto. Ni aŭdis pri la Internacia Kortumo en Hago.

La Ligo ja sukcesis sur la socia kampo, en la lukto kontraŭ la "blanksklava komerco" de virinoj kaj infanoj. Ĝi administris la sistemon de koloniaj "Mandatoj". Ĝi kuraĝigis kunlaboradon pri "intelektaj aferoj". Ĝi provizis forumon por atingi kelkajn politikajn akordojn. Ĝi eĉ laŭdetis Esperanton! Sed, kiam Japanio invadis Ĉinion, faŝisma Italio atakis Etiopion, kaj nazia Germanio eniris Ĉeĥoslovakion kaj minacis Pollandon, la Ligo de Nacioj ne kapablis havigi pacon kaj sekurecon. En 1939 la nova "Palaco de la Nacioj" en Ĝenevo tute ne sukcesis haltigi la agreson.

Dua Mondmilito – Interdiskutado pri plibonigita Organizaĵo

La tago, kiam Germanio invadis Pollandon fine de aŭgusto 1939, mi estis en Hago, studante internacian juron. En la Pacpalaco, sidejo de la Internacia Kortumo, kiu ankaŭ faris nenion, mi solene ĵuris, ke mi dediĉos mian vivon al la plifortigo de internacia juro por preventi novajn militojn.

En Oksfordo, kie mi finis miajn studojn, kaj en Londono en la Reĝa Instituto por Internaciaj Aferoj, ni diskutadis, eĉ dum la naziaj armeoj okupis kaj subigis Francion, kaj la brita armeo retiriĝis al Anglio, kiel oni devos reorganizi la mondon, kiam la paco revenos.

Kiel juna diplomato en la aŭstralia Departemento pri Eksterlandaj Aferejoj, en Kanbero, dum ni penadis preventi militon en Pacifiko, mi studis, kun amikoj en ekonomiaj departementoj, la organizdemandojn de postmilita mondo. Eĉ en la armeo, en kiu mi fariĝis soldato en 1942, dum ni atendis inter bataloj, ni pensis pri la problemoj

kiel pli bone organizi internaciajn aferojn, por malebligi la militon.


En 1943 oni sendis min al la aŭstralia Altkomisiejo (ambasadejo) en Kanado. El Otavo, kun mia ĉefo, mi iris al Kebekio, dum vizitoj de S-ro Churchill kaj Prezidanto Roosevelt, kaj eksciis pri la planoj de la aliancanoj, aprobitaj de Stalino, por la internacia kunlaborado post la venko super Hitlero kaj eventuale Japanio.

Post Konferenco pri Internacia Civila Aviado en Ĉikago en 1944, mi helpis pri la starigo, en Montrealo, de la Internacia Organizaĵo pri Civila Aviado. Tio ŝajnis al mi utila afero, kaj fakte, dum pli ol 50 jaroj ĝi bone funkcias.

La "Unuiĝintaj Nacioj" kreas organizaĵojn

En 1945 okazis en San-Francisko la grandioza Konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj (la aliancanoj kontraŭ Germanio kaj Italio) pri internacia organizado. Mi persone ne partoprenis, sed la aŭstralia Ministro pri Internaciaj Aferoj kaj kelkaj el miaj amikoj estis tie. Ni aspiris krei organi-

UN 50



Ĝenerala panoramo de la Konstanta Sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko vidata de la sudo de la UN-areo. La konstruaĵoj estas la 39-etaĝa Sekretariato (dekstre), la Ĝenerala Asembleejo (centre) kaj la Biblioteko (malantaŭe). En la fono estas la Konstruaĵoj Aloca [alokaj], kie la Disvolvig-Programo de Unuiĝintaj Nacioj kaj la Fondaĵo por Infanoj de Unuiĝintaj Nacioj havas siajn oficejojn. La UN-areo kovras deksek akreojn, sesblokan areon sur insulo Manhatano, de la 42-a Strato ĝis la 48-a Strato inter Kvina Avenuo kaj la Orienta Rivero.

Unuiĝintaj Nacioj festas sian
50-jariĝon en 1995.

Ralph Harry, eksambasadoro
de Aŭstralio ĉe UN, rakontas
pri la eksto de la plej alta
organizaĵo sur la Tero.

D-jara

Celoj de Unuiĝintaj Nacioj (Artikolo 1-a de la Ĉarto)

1. Konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon kaj tiucele apliki efikajn kolektivajn rimedojn por preventi kaj forigi minacojn kontraŭ la paco kaj por subpremi ĉian agon de agreso aŭ alian rompon de la paco, kaj realigi, per pacaj metodoj konforme al la principoj de justeco kaj internacia juro, la ĝustigon aŭ la solvon de internaciaj disputoj aŭ de situacioj, kiuj povus konduki al rompo de la paco;

2. Evoluigi inter la nacioj amikajn rilatojn bazitajn sur la respekto al la principo de egalaj rajtoj de la popoloj kaj de ilia rajto decidi pri si mem, kaj apliki ĉiajn aliajn rimedojn taŭgajn por plifirmigi universalan pacon;

3. Realigi internacian kunlaboradon por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio; kaj

4. Esti centro por harmoniigi la klopodojn de la nacioj por atingi tiujn komunajn celojn.

La organizaĵo ekvivas

Dum oni atendis la ekvalidon de la Ĉarto, prepara komitato en Londono verkis procedurajn regulojn por la ĉefaj organoj. Estis interkonsento, ke la ĉefejo de la Organizaĵo devas esti en Usono, kio certigos (kontraste al la nemembriĝo de Usono en Ligo de Nacioj) la daŭran intereson de tiu potenco en UN. Kelkaj landoj, inter ili Aŭstralio, opiniis, ke estus bone loki la sidejon en San-Francisko, por substreki la gravecon de la Pacifika Regiono. Sed kiam la familio Rockefeller proponis donacon de tereno apud la Orienta Rivero en Nov-Jorko, oni decidis starigi la ĉefan sidejon en tiu urbo. Estis ankaŭ eŭropa ĉefejo en Ĝenevo en la Palaco de la Nacioj.

Mi havis la sperton partopreni en la fruaj kunvenoj de la Asembleo en Nov-Jorko. Malgraŭ niaj plej bonaj klopodoj, ni ne sukcesis atingi interkonsenton pri la forigo de atomaj armiloj aŭ pri la kunlaborado por la evoluigo de atoma energio. Usono, kiu tiutempe sola posedis atomajn armilojn, eble estus konsentinta ilin detrui, sed nur se aliaj landoj akceptus inspektistojn de UN sur siaj teritorioj. Ni ankaŭ diskutis, sed faris malmulton por preventi, la daŭrigan de la konkuro pri konvenciaj armiloj. Sed la organizaĵo pri infanoj ja havis kelkajn sukcesojn. ➔

Pluraj ekskolonioj, ekzemple Indonezio, estis agnoskitaj kiel sendependaj landoj. Pri aliaj la Kuratoreca Konsilio aprobis interkonsenton, laŭ kiu la respondeca lando akceptis devojn. UN sendis de tempo al tempo vizitmisiojn por kontroli la administradon. Kaj komitato de la Asembleo stimulis aliajn kolonilandojn prepari la popolojn de siaj kolonioj por aŭtonomio aŭ sendependeco. Preskaŭ ĉiun jaron la Asembleo proponis al la Sekureca Konsilio la akcepton de unu-du novaj membroj en la organizaĵo. Post kelkaj jaroj la antaŭaj malamikoj de la Unuiĝintaj Nacioj fariĝis membroj.

Oni kreis ankaŭ la "krizan" Internacian Fonduson por Infanoj, per kiu oni organizis helpon al patrinoj kaj infanoj. Post nelonge evidentiĝis, ke tia organizaĵo estas konstanta bezono. Post kvindek jaroj UNICEF daŭre bonege funkcias.

Estis same pri helpo al evoluantaj, malriĉaj landoj. Post la Dua Mondmilito oni havis specialajn programojn, ekzemple la Planon Marshall, por la rekonstruo de ekonomioj en Okcidenta Eŭropo, detruitaj dum la milito. Unuiĝintaj Nacioj starigis konstantan organizaĵon, evoluprogramon, kiu daŭre helpas ne nur la militviktimojn, sed ĉiujn, kiuj bezonas helpon por atingi akcepteblan vivnivelon.

Same la postmilita organizaĵo por helpi rifuĝintojn (Internacia Organizaĵo por Rifuĝintoj) estis anstataŭigita de la Oficejo de la Altkomisiito de UN pri Rifuĝintoj. En la 1950-aj jaroj ni esperis, ke la problemoj pri rifuĝintoj estos solvita — sed novaj fluoj de rifuĝintoj konstante okazas. UN tamen ludis tre utilan rolon.

Unu atingo de la fruaj jaroj estis la akcepto, fare de la Ĝenerala Asembleo, preskaŭ unuanime, de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĝin verkis komitato, de kiu mi estis membro, kies prezidanto estis s-ino Eleanor Roosevelt, la vidvino de la Prezidanto de Usono. Tiu dokumento, kaj la pli detalaj Konvencioj pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj Ekonomiaj kaj Sociaj Rajtoj fariĝis fundamentoj de la etikaj principoj de la homaro el kiuj ĉiuj popoloj kaj eĉ individuo povas citi por protekti siajn rajtojn. E-versio certigis, ke la tutmonda esperantista komunumo estis bone informita pri homaj rajtoj.


Politikaj problemoj

Unuiĝintaj Nacioj mem ne havis rolon en la preparo de la pactraktatoj kun Italio, Germanio kaj Japanio. La artikolo 107 de la Ĉarto preskribis, ke "Nenio en tiu Ĉarto senvalidigas aŭ malebligas, rilate al iu ajn ŝtato kiu dum la Dua Mondmilito estis malamiko de iu ajn subskribinto de ĉi tiu Ĉarto, agadon entreprenitan aŭ permesitan, rezulte de tiu Milito, de la Registaroj kiuj repondeas pri tiu agado. Germanio restis dividita. La baltaj ŝtatoj restis parto de Sovetunio. Ankaŭ Koreio havis du zonojn, okupitajn de Sovetunio kaj Usono.

Unu tikla problemoj, tamen, venis tre frue en la Ĝeneralan Asembleon, nome la sorto de Palestino, de kiu Granda Britio estis mandata ŝtato, sed kiu deziris cedi sian respondecon. UN starigis komisionon por studi la problemon. Ĝi rekomendis dividon de la lando inter juda kaj araba ŝtatoj. Bedaŭrinde la landlimoj de la nova Israelo ne estis akcepteblaj por ĝiaj najbaroj, kaj kvankam Israelo fariĝis membro de UN, konflikto okazis. Malgraŭ iom da progreso, la perturboj ankoraŭ daŭras.

Kvankam la situacio en Koreio estis rezulto de la Pacifika Milito, Unuiĝintaj Nacioj ankaŭ tie entreprenis agadon. Komisiono de UN ne sukcesis atingi interkonsenton por tutlanda registaro, kaj estis decidite organizi balotadon nur en la suda parto. La rezulto estis la daŭrigo de du Koreioj kaj, kiam en 1950 la norda ŝtato provis unuigi la landon militforte, Unuiĝintaj Nacioj (per decido de la Sekureca Konsilio, kiam Sovetunio forestis) subtenis la registaron en Seulo. La Ĉina Popola Respubliko subtenis la nordan registaron, kaj la rezulto estis armistico, kiu ankoraŭ daŭras. Oni povis diri, ke UN rezistis la agreson, sed oni devis konfesi, ke ĝi ne atingis solvon de la baza politika problemoj.

En Vjetnamio, en iom simila situacio, UN ne ludis gravan rolon, kvankam la Ĝenerala Sekretario de tempo al tempo proponis siajn servojn por provi ĉesigi la aerbombadon. Nur post la fina venko de la Popola Respubliko en 1975, Vjetnamio fariĝis membro de UN.



La specialiĝintaj institucioj

Taksante la valoron de la agado de UN en la pasintaj 50 jaroj oni devas ne forgesi la laboron de la specialiĝintaj institucioj.

La forigo de variolo fare de Internacia Organizaĵo pri Sano estis triumfo de internacia kunlaborado. Ni esperu, ke IOS estos egale sukcesa en la batalo kontraŭ la aids-viruso.



La organizo por rifuĝintoj, en Sarajevo.

La Internacia Telekomunika

Unio kaj Internacia Civil-Aviada Organizaĵo ambaŭ faris bonegan laboron, kvankam foje lingva miskompreno ankoraŭ endanĝerigas aviadilon.

Unesko faris multon por antaŭenigi internacian interkomprenon. Ĝi agnoskis, ke la Esperantomovado havas similajn celojn — ekzemple dank' al la libroserio Oriento-Okcidento, aŭspiciita de UEA, literaturaj ĉefverkoj de diversaj kulturoj estas legeblaj en la Internacia Lingvo.



UNICEF donas vitaminon en Bangladeso.

Ambasadoro de Aŭstralio Ralph Harry alparolas la Ĝeneralan Asembleon de UN (1978).

En 1951 li esperantiĝis la Ĉarton de UN kaj oni tradukis ankaŭ la Statuton de la Internacia Kortumo. Post polurado de Ivo Lapenna, Eskil Svane, Claude Piron kaj aliaj, UEA aprobis la tekstojn kaj per kontrakto kun la Oficejo de Publika Informado en Nov-Jorko, aranĝis eldonon de 20 000 ekzempleroj en 1979.

La sekretariato

La sukcesoj de Unuiĝintaj Nacioj ne estus eblaj sen la fidela laboro de la konstantaj oficistoj de la Sekretariato de UN.

Mi admiris la kapablon de la pioniraj Ĝeneralaj Sekretarioj Trygve Lie, Dag Hammarskjöld kaj U Thant. Postaj Ĝeneralaj Sekretarioj daŭrigis tiun tradicion.

Artikolo 101 preskribis, ke "La decida konsidero en la dungo de oficistoj kaj en la difino de iliaj labor-kondiĉoj, devas esti la neceso akiri la plej altajn gradojn de kapableco, kompetenteco kaj honesteco." Sed ĝi aldonis:

"Ankaŭ la graveco de enoficigado sur kiel eble plej vasta geografia bazo devas esti atentata."

Ĉi tio signifas, praktike, ke ĉiu ŝtatmembro atendas, ke unu-du el ĝiaj ŝtatanoj ricevu postenon en la Sekretariato. Estas grave, ke kapablaj homoj estu nomumitaj. La graveco de spertega oficistaro evidentiĝas, kiam UN devas kunordigi armfortojn por la atingo kaj konservado de la paco.

Fino de la Malvarma Milito — Esperoj

La fino de la tiel nomata "Malvarma Milito" inter la kapitalista kaj komunista blokoj estigis esperojn, ke en Unuiĝintaj Nacioj la grandaj potencoj povos kunlaboradi en la Sekureca Konsilio, anstataŭ uzi siajn vetorajtojn por malebligi agadon de UN en neakordo kun iliaj naciaj interesoj.

Sainas, ke ja ekestis nova "aktiva" periodo en la historio de UN. Kiam Irako invadis Kuvajton UN aprobis reziston per grandskala uzo de usonaj kaj aliaj armfortoj.

La kunlaborado de la antaŭaj rivaloj en la Sekureca Konsilio plifortigis la tendencon, ke UN agu pri aferoj iam konsideritaj apartenantaj al la "interna jurisdikcio" de ŝtato.

La paco de Kambogo por barotado kaj la malpli sukcesa agado en Somalio estis ekzemploj. Oni povas citi ĉi-rilate la intervenon de UN tra la jaroj por forigi apartigon de la rasoj en Sud-Afriko, interveno, kiu fine sukcesis en la pasinta jaro.



Specialaj Jaroj

Kvankam Esperanto, tradicie, estas neŭtrala rilate partipolitikon, esperantistoj multmaniere subtenas la laboron de UN. Tio estas aparte evidenta dum la "specialaj jaroj" kaj "specialaj jardekoj" deklaritaj de la Ĝenerala Asembleo.

En Universalaj Kongresoj kaj en la landaj asocioj informiloj estis dissemataj pri, ekzemple, Internaciaj Komunikiloj, la Rajtoj de Virinoj kaj de la Infano, Analfabeteco, la Naturmedio, la Indiĝenaj Popoloj kaj Familio. Partoprenado en tiuj "kampanjoj" fariĝis parto de la ĉiujara vivo de esperantistoj.

"Mi renkontis eĉ gajajn ciganojn" (dekstre), gajninto de la Ora Palmo en la Filmfestivalo de Cannes 1967, de la jugoslava reĝisoro Aleksandar Petrović.

1995 estas "Jaro de Toleremo". Profitante la centjariĝo de kino en 1995,

Unesko eldonis broŝuron, kie listiĝas filmoj (re)vidindaj, inter kiuj troviĝas "La mortigaj kampoj", "La elekto de Sofia", "Adiaŭ infanoj", Suno trompanta, Brulo de Misisipo, La purpura koloro, La misio, Kriu Libereco, La listo de Schindler, Gandhi...



AKTIVU POR UNESKO EN ESPERANTO!

Jes, Esperantistoj havas sian propran "Unesko-klubon", kiu eldonas revuon, efektivigas projektojn kaj organizas aranĝojn. Skribu al ĝi! **Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo, p/a Pascal Lécaille, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cédex 03, Francio.**

La fama kantistino Olivia Newton-John vizitis la sidejon de UN en Nov-Jorko en 1977. Ralph Harry elmontris al ŝi la funkcion de la interpretsistemo. "Kion faras UN por savi la balenojn?" — estis ŝia ĉefa demando.

Principoj de Unuiĝintaj Nacioj (Artikolo 2-a de la Ĉarto)

1. La Organizaĵo estas bazita sur la principo de suverena egaleco de ĉiuj siaj Membroj.
2. La Membroj de la Organizaĵo, por certigi al ĉiuj la rajtojn kaj avantaĝojn rezultantajn de ilia membreco, devas plenumi bonafide la devojn, kiujn ili alprenis konforme al ĉi tiu Ĉarto.
3. La Membroj de la Organizaĵo devas solvi siajn internaciajn disputojn per pacaj metodoj tiamaniere, ke nek la internacia paco kaj sekureco nek la justeco endanĝeriĝas.
4. La Membroj de la Organizaĵo devas sin deteni en siaj internaciaj rilatoj de la minaco aŭ la uzo de perforto ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de iu ajn ŝtato, ĉu en iu ajn alia maniero nekomforma al la Celoj de Unuiĝintaj Nacioj.
5. La Membroj de la Organizaĵo devas doni al Unuiĝintaj Nacioj plenan helpon por iu ajn agado entreprenita de ĝi konforme al ĉi tiu Ĉarto kaj deteni sin de helpe al ŝtato kontraŭ kiu Unuiĝintaj Nacioj entreprenas preventan aŭ kompulsan* agadon.
6. La Organizaĵo devas prizorgi, ke la ŝtatoj kiuj ne estas Membroj de Unuiĝintaj Nacioj agu konforme al ĉi tiuj Principoj tiom kiom necesas por konservi la internaciajn pacon kaj sekurecon.
7. Nenio en ĉi tiu Ĉarto rajtigas Unuiĝintajn Naciojn interveni en aferojn kiuj esence apartenas al la interna jurisdikcio de iu ajn ŝtato, nek devigas la Membrojn submeti tiajn aferojn al solvproceduro laŭ ĉi tiu Ĉarto; tamen ĉi tiu principo neniel antaŭlimigas la aplikon de la kompulsaj rimedoj difinitaj en Ĉapitro VII.

kompulsa: deviga

anonc tabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

Establite la unuan privatan E-lernejon de Mongolio ni bezonas lerno-materialon kaj korespondamikojn por niaj gekursanoj. Poŝtfako 44, pk 117, Ulaanbaataro 210644, Mongolio.



Lernema kaj bel-aspekta
24-jarulo aspiras

fondi internacian familion kun e-istino, kiu aĝas ne pli ol 30 jarojn. Dong Shulin, Zaozhuang Mei Kuang Cai Mei Wu 9u, CN-277101 Zaozhuang Shandong, Ĉinio.

16-jaraj Olia, Lena, Sveta kaj Alsu deziras korespondi. Skribu al Jelenaĭ, Taikos g-ve 68-54, Visaginas 4761, Litovio.

Kiu povas helpi min kapabliĝi pri E-instruado?
Sylvester N. Nyinyimbe, P.O. Box 147, Bunda, Tanzanio.

Studentino de instruista atlernejo deziras korespondi kun homo el la tuta mondo. Ŝi interesiĝas pri astrologio, orienta filozofio, religio, kulturoj, filozofio de Henrik, historio. Svetlana Litvinova, a/k 2040, RU-656064 Barnaul-64, Rusio.

Mi tre volas plulerni Esperanton kaj trovi korespondamikojn en aliaj landoj. Mehrdad Sedighi, Pasdaran ave., IR-75361 Bandar Daglam, Irano.



"Mi tre ŝatas leteri kaj inter-sanĝi

bildkartojn". 26-jara komencanto, studinto pri la franca deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Boris Arrate Veranes, Calvario 560 (Bajos), c/n Heredia y Aguilera, Stgo 1, CU-90100 Santiago de Cuba, Kubo.

35-jara hoteldirektoro deziras korespondantojn en la tuta mondo. Thomas Urembo, Mount Livingstone Hotel Ltd., P.O. Box 1401, Mbeva, Tanzanio.

La solaj junaj kazaĥaj esperantistoj, i. a. 11-jara Dinara, 12-jara Nataŝa, 15-jara Almagul kaj 16-jara Oksana, deziras trovi korespondamikojn tutmonde. Instruistino: Majra Baradosova, Ciolkovski 2, 417003 Uralsk, Kazaĥio.

Laboron en evoluintaj landoj serĉas 20-jara junulo A. N. Truŝ, Ĉudnovskij 2-n, UA-261613 Krasnopolj, Ĵitomirskaja obl., Ukrainio.

26-jara kuracistino deziras trovi korespondamikojn en aliaj landoj. Elena Utkina, ul. Voloĉaevskaja 38-68, RU-152915 Ribinsk, Jaroslavskaja obl., Rusio.

20-jara studentino deziras korespondi tutmonde. Azita Ghazi, 22 Jennat Lane, Saiidieh Str., IR-65168 Hamedan, Irano.

19-jara studentino deziras korespondi tutmonde. Leila Shakeri, 21 Hedayati Lane, Seyedmostafa Str., IR-69167 Borujerd, Irano.

La sekretario de la Tutgalaksia Kongreso de la Universala Volapuga Asocio havas la kutimajn problemojn por kunordigi tro plenan programon. Pro la tromulteco de la fakaj asocioj, estas malfacile asigni al ĉiu apartajn

Organizaci problemoj

ĉambrojn kaj horon. Finfine tamen ĉio estas taŭge aranĝita. Per la helpo de la apudaj helpindikoj malkovru, kiu faka asocio kunvenis en kiu ĉambro, je kiu tago, kaj kio estas la nomo de ĝia prezidanto.

Sendu vian rezulton al nia redakcio antaŭ la 30-a de septembro 1995. Ĉi-foje ni lotumos du fojojn, tiel ke estos pli da ŝancoj venki! Temas pri la unuaj libroj de du ĵus lanĉitaj serioj de Grupo Nifo: vol. 1 de "Orbito nula" kaj *La Imperio Ornaks* de "Future". Krome al ĉiu, kiu interesiĝas pri sciencfikcio, ni sendos senpagan ekzempleron de *KONTAKTO* n-ro 70 (1981:2), kiu pritraktis tiun temon (kaj bildrakontojn en E-o). Bonvolu sciigi, ĉu vi deziras ricevi tiun numeron!



nifo: ne-identigita fluganta objekto

tago	faka asocio	ĉambro	p

Labortago en mia vivo

facila

— Chan Sook Wai, Malajzio

Subite mi vekiĝas je la 05h30 kaj rigardas la ŝorloĝon, kiun mi havas sur la brako: “Ankoraŭ duona horo. Bone!” mi diras al mi mem kaj ekdormetas ĝis la 06h00. Tiam mi ellitiĝas kaj ordigas la liton.

Kun duon-malfermitaj okuloj mi iras al la banĉambro. Poste mi surmetas vestaĵojn, kiujn mi jam pretigis la antaŭan nokton — tiel mi ne perdas tempon decidante, kion uzi. Mi iom ekzercas min por esti pli veka kaj komencas matenmanĝi. Je la 07h00 mi eliras el la domo al mia laborejo. Veturante en la buso mi ĉirkaŭrigardas. “Ju* pli longe la homoj veturas al sia laborejo, des* pli ili emas dormi en la buso. Kiel eblas, ke ili eliras ĉe la ĝusta haltejo? Ĉu sub-konscie*?” — mi miras.


Jen la haltejo, kie mi devas elbusiĝi! Mi sonorigas* kaj eliras. Mi atente flankenrigardas pro la multaj aŭtoj. Dum mi alproksimiĝas al mia laborejo miaj pensoj jam estas ĉe taskoj farotaj dum la tago. Aha! Ankoraŭ neniu alvenis. Mi malfermas la pordon kaj lumigas ĉion.

ju pli... des pli: kiom pli... tiom pli...
konscii: havi klaran scion pri siaj agoj
kolego: sam-labor-ano
sonorigi: sonigi — por haltigi buson, ekz.
ŝviti: eligi “sun-akvon” tra la haŭto

Kuala-Lumpuro, ĉefurbo de Malajzio, kie la aŭtorino vivas.

La bona ingo

... KE LI, KUN
KONDOMO,
NENIAM ...
HA! MI DO
DIRIS, KE MI NE
PRENAS LA
PILOLON!



MENSO-
GULIN!



Iom post iom alvenas miaj kolegoj*. Ili faras trinkaĵon. Je la 08h30 ĉiu estas ĉe sia skribotablo kaj komenciĝas la labortago. Venas telefonvokoj, la homoj parolas senĉese, komercas kaj simile. Gravaj paperoj kuŝas ĉie sur mia tablo... per kio komen- ci?! Mi skribas kaj parolas. Iu vokas min kaj mi rapidas al li — problemoj por solvi. Estas multaj kontrolendaj aferoj. Mi soifas...

Je la 12h30 ĉiuj ĉesas labori. Mi iras manĝi kun kolegoj. Pro la forta suno mi ŝvitas*... sed kia plezuro alveni al la manĝejo!

Je la 13h30 mi estas denove en la laborejo kaj daŭrigas la streĉan tagon. Fin-fine la problemoj solviĝis kaj la taskoj estas faritaj. Je la 17h30 mi kun la kolegoj ĉesas labori kaj ni pretigas nin por iri hejmen. Adiaŭinte ilin, mi iras al la bushaltejo kaj atendas la buson, kiu veturigos min al la urbocentro. Jam tie, mi devas ŝanĝi al alia buso. Atendante la alian, mi vidas veni pli kaj pli da homoj. “Ho, ve, mi devos batali por eniri la buson kaj trovi sidlokon!”, mi rimarkas. Venas buso kaj... □

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj feroj. Kunsendu internacian respondkuponon, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. *KSM* pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj, de kiu(j) vi ricevos rektan respondon. Se post kelkaj semajnoj tio ne okazis, reskribu al *KSM* por plia provo. Kun *KSM* vi sukcesos!



KSM

Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

Vizito al mia kampara hejmo

— Sanu Adepoju, Niĝerio

Ĉu renkontiĝi kun homoj plaĉas al vi? Ĉu vin interesas ekscii iom pri la kulturo kaj vivmaniero de aliaj homoj? Ĉu vi ŝatas viziti diversajn lokojn? Se jes, bonvolu veni kun mi al mia kampara hejmo! Eble vi povas veni kun viaj amikoj...

Surprize?! Bonvolu ne esti surprizita. La kulturo de afrikanoj ne postulas, ke vi estu invitita antaŭ ol viziti iun iam – vi estas bonvena ĉiam. La pordo de mia hejmo ĉiam malfermiĝas al amikoj, najbaroj kaj vizitantoj.

Antaŭ ol komenci la vojaĝon, eksciu iom pri mia kampara hejmo: Mi estas el la joruba popolo, unu el la tri plej grandaj triboj en Niĝerio. Joruboj troviĝas en la sudokcidento de Niĝerio: ili estas tre gastamaj kaj amikemaj. Kion vi atendu? Atendu tre varman bonvenigon!

Nun vi estas tie. Ĉu vi rimarkas la manieron, kiel ili salutas vin? La knaboj sternaĝas, la knabinoj genuas kaj la pli maljunaj manpremas vin. Ĉu vi sentas, ke la salutoj estas tre longaj? Fakte ni salutas la tutan tagon; tiel longe kiel oni estas vidata, ni salutas – ĉar ni zorgas pri via bonfarto. Ni konsideras, ke oni ne estas bonvena, se la salutoj mallonge daŭras. “Kiel vi fartas? Kia estis la vojaĝo? Kiel fartas la familio?”... Longaj salutoj. Ili estas parto de la ĝentileco de joruboj.

Nun vi estas en mia hejmo, kaj multaj homoj salutas vin. La salutoj ne ĉesas! Jen! Tiuj multaj homoj estas parto de mia familio! Ni ĉiam havas grandajn familiojn, kaj fakte la vorto “familio” en la joruba lingvo etendiĝas al ĉiuj parencoj.

Bonvolu eksidi! Jen tasoj da akvo ĉerpita el *ikoko* (= poto farita el argilo por malvarmigi la akvon). Mia avo alportas kola-nuksojn. Li rompas ilin kaj preĝas; li nun proponas la pecojn al ni. Bonvolu ne rifuzi ion proponitan al vi; via akcepto montras, ke vi aprezas ĉion, kion ili faras.

Ĉu vi aŭdas la sonon, kiu venas de la kuirejo? Estas la sono de la pistilo kaj pistujo: *lyan* (= pistita ignamo) estas preparata! *lyan* estas tre bongusta manĝaĵo servata kun *egunsi* (= vegetaĵa kaj melona saŭco).

Vidu mian patron, kiu alportas *emu* (= palmvinon) en kruĉo farita el kalabaso! Akceptu ĉi tiun kalabasan tason, utiligu ĝin por trinki la palmvinon! Amiko de mia patro alportas grandajn pecojn de rostita viando de sovaĝaj bestoj. Kun la viando oni trinkas la palmvinon. Mia patro ŝercas dirante: “Elportu la lumon por la gasto! La posedanto de la domo ne fermas siajn okulojn.” Tio estas sentenco, kiu signifas, ke ĉio, kio prezentiĝas al la gasto, estas ankaŭ por la posedanto de la domo. La palmvino kaj la rostita viando gustas bone. Kaj jen biero, kiun vi trinkas afrikmaniere!

“La manĝaĵoj estas pretaj!”, la patrino anoncas. Ŝi kaj miaj fratinoj alportas la pistitan ignamon en pelvo kaj *egunsi* kun viando en aliaj pelvoj. Bankedo! Jes, la manĝaĵoj por gasto ne estas ordinaraĵoj, sed festeno!

Vi supozas, ke vi havos manĝilaron? Ne! Por manĝi ni uzas niajn fingrojn, la naturajn manĝilojn. Bonvolu lavi viajn manojn en la pelvo da akvo!



Kial la kuloj sangosuĉas?

— Kizeyidioko Mayinda, Zairio

En vilaĝo Pipo vivis du geedzoj. Ili estis feliĉaj kaj nenio malpacigis ilian hejm-mastrumadon. Iam la edzino malsaniĝis, kaj ĉar neniu kuracilo povis ŝin sanigi, ŝi mortis. Ŝia edzo restis tiel nekonsolebla, ke li rifuzis entombigi sian edzinon kaj decidis daŭre vivi apud la kadavro. La vilaĝanoj tamen ne plu povis elteni la malbonodoron kaj do ordonis al la malfeliĉulo, ke li entombigu ŝian kadavron. Ili decidis iri vivi sur la akvo kaj kunportis sur boato la restaĵojn de sia edzino. Li vivis tie dum multe da tempo. Iam ŝi iris al apuda vilaĝo serĉi provizaĵojn – tiam ŝi profitis la okazon por fuĝi. La viro trovis ŝin laŭ la piedspuroj kaj riproĉis ŝian nedankemon. La edzino tamen ne volis havi ion ajn komunan kun la viro, kaj do decidis redoni la sangoguton al li. Ŝi pikis al si fingron kaj fluigis guton da sango, sed iĝis kun la akvo kaj tute aliĝis en larvojn, poste en multego da kuloj, kiuj senripoze ataketas kaj maloportunas nin per siaj zumoj kaj pikoj. Estas la virino, kiu provas piki por rabi al ni guton da sango, kiu denove revivigu ŝin.




Bonvolu diri, kiel vi vin sentas! Mi nun ŝatus, ke vi diru, kiel vi ĝuas la bankedon... Ho, la saŭco havas pipron! La kredo ĉi tie estas jena: Homo, kiu ne manĝas multan pipron, ne vivas longe. Multe da pipro en la ŝaŭco estas konsiderata kiel plibonigilo de via sano.

Nun vi estas forironta, sed antaŭ ol vi ekiras, vi devas viziti miajn najbarojn, ĉar mia gasto estas ankaŭ la gasto de miaj najbaroj. Bonvolu akcepti ĉion, kion ili donas al vi! Eĉ se vi jam estas sata, vi devas manĝi, kion ili servas al vi, ĉar se vi ne akceptas, ili ne estos feliĉaj pri tio. Ĉie, kien vi iras por vizito, ili donas al vi donacojn, aparte donacojn de la bieno.

La vizito finiĝis, sed la memoro daŭros. Ĝis la revido! “Salutojn al via familio!... Ĉu vi revenos alian fojon...? Bonvolu veni!” ... Salutoj kaj salutoj – ĝis vi fine ne plu estas videbla. Bonvolu reveni denove! Vi estas ĉiam bonvena en mia kampara hejmo!

□



ijk Ujĉioj


Atiljo Orellana Rojas,
Argentino



Nordoriente en Argentino troviĝas pluraj indiĝenaj komunumoj, kiuj apartenas al etno *wichi* (= ujĉi).

Tiu nomo signifas "popolo" kaj lastatempe ĝi komencas enradikiĝi prefere al la pli komunaza *mataco* [matako], kiel nomis ilin la hispanaj invadistoj dum la kolonia periodo, ĉar tiu vorto en la ujĉia lingvo signifas "bestaĉo". Mi prezentos kelkajn trajtojn de du el tiuj komunumoj, nome El Algarrobal [el algarobal'] kaj El Chañarcito [el ĉanjarsito], ambaŭ en provinco Salta.

Ujĉia simbolo de eterneco. Dualeco viro-ino, noktago, lumotenebro.



La medio

En la regiono dum vintro la temperaturo estas varmeta kaj somere ĝi varias inter 40° kaj 45°. La sekecperiodo etendiĝas de aprilo ĝis novembro kaj la pluvsezono de novembro ĝis aprilo. Ĉi tiam la regiono fariĝas komplete netrairebla: la koto baras ĉiajn veturilojn, eĉ traktorojn, kaj kiam la rivero kreskas, al kio aldoniĝas pluvo, subakviĝas la ebenaĵo, pro kio la domaro devas konstante translokiĝi.

La kreskaĵoj estas doroplenaj, kun dura ligno, responde al tiaj kondiĉoj. Nur somere la grundo kapablas ĝermigi ion, sed vintre ĉio denove iĝas seka. La loka flaŭro provizas per kelkaj fruktoj, tuberoj, gruŝo, *chañar* [ĉanjar'] (Gourliea decorticans), bromelioj, vicioj, jujuboj kaj sovaĝa mielo, kiujn ujĉioj rikoltas por la ĉiutaga manĝado. Ujĉioj krome semas maizon, kukurbon, fazeolon, akvomelonon, melonon kaj tabakon.

Rilate la bestaron, ĝi konsistas ĉefe el birdoj en mirinda vario; fiŝoj kiel alosa, *boga* [boga] (Leporinus obtusidens), korifeno, *surubi* [surubi] (Pseudoplatystoma coruscans), aproj, da-

ĝenoj kaj grandigas tiun de la bienposedantoj. Ujĉioj ne mastras sian propran grundon!

La problemo

La registaro de Salta konstruigis lernejon kun tri lernoĉambroj en ĉiu komunumo. La instruado inkludas programojn, kiuj dissolvas la identecon de tiu popolo kaj transformas ilin en "homojn por servi aliajn", tial ke ujĉioj akceptu pasive submetiĝi al la superecaj blankuloj. Al tio vikle kontribuas la laboro de misiistoj (evangeliistoj, anglikanoj, pentekostanoj, katolikoj, mormonoj k.a.). Anglikanaj

pastroj posedas tie, en Salta, 3000 hektarojn. Tiuj homoj evangelizas la ujĉiojn de 1914 kaj maldank' al ili la aŭtoktona popolo iom post iom devas forlasi siajn kutimojn, kredon,

zipoj, formikursoj, igvanoj, jaguaroj, kapreoloj, simioj, tapiroj kaj vizkaĉoj (Lagostomus). Tia faŭno estas ankaŭ manĝaĵfonto por la lokaj loĝantoj, kvankam ĉiam malpli, ĉar la metalfadeno, kiuj dividas la grundojn, ade malgrandigas la ĉasteritorion de la indi-

donas la miljarajn teknikojn pri manfaritaĵoj: teksado de fadenoj faritaj el *cháguar* [ĉa'gvar] — loka herbo, ĉizado de statuetoj el ligno kun inkrustitaj ostoj ktp. En la lernejoj la libroj estas maloftaĵo kaj la lernantoj uzas fotokopiojn, kiujn faras la anglikanoj mem kaj oni heredas

de unu jaro al alia. Fine de la elementa lernejo, laŭ vortoj de membroj de la lerneja kooperativo, la lernantaro apenaŭ kapablas subskribi. En du lokaj metiejoj oni instruas al viroj la aplikadon de elektro kaj al virinoj kuirarton — fremdaĵo en loko, kie drato kaj kuiroleo estas luksaĵoj.

En nur unu el la komunumoj, nome El Chañarcito, troveblas akvo. En El Algarrobal ekzistas tri manaj pumpiloj, per kiuj oni povas eltiri akvon el tavolo enhavanta altan salprocentaĵon kaj malmulte da pureco. Kuracservoj maloftas: ne estas tie kuracisto aŭ dentisto, nur flegisto en ĉiu komunumo, kiu ne havas eĉ la minimumajn rimedojn por steriligi la ilaron.

Virina laboro estas la plej peza – Ŝi provizas ĉion por la vivo kaj ŝi estas tiu, kiu havas la veran decidpovon en la komunumo. Varti la infanojn, kuiru, serĉi akvon, lignon kaj fruktojn, ŝpini ŝafan lanon kaj kotonon, produkti ŝnuron el la trunko de *cháguar* por posta kolorigo per vegetalaj tinkturoj kaj teksado de sako, zonoj, kurtenoj, tapiŝoj — estas virinaj taskoj, krom fari diverstipajn kolĉenojn el semoj, ligno kaj ostoj. Ankaŭ pri ceramiko ŝi okupiĝas, farante diktavolajn amforojn porteblajn surdorse kaj bestoformajn ujojn tipe ujĉiajn, kies nomo estas *yoteh*. Kompreneble, la virino ankaŭ helpas la viron en la konstruado de la hejmo. La domo konsistas el ununura ĉambro unuporda kun muroj el adobo aŭ diversaj arbobranĉoj interplektitaj. En ĝi la homoj nur dormas, ĉar la ceteron de la tago ili pasigas sub tegmento subtenata de ses fosto, aŭ simple sub iu apuddoma arbo. La viro, siaflanke, ĉasas bestojn kaj ĉizas lignon el gvajako, jujubo, blanka kaj ruĝa kebraĉoj k.a. por produkti statuetojn; estas li, kiu zorgas pri la publikaj rilatoj, ŝatante longtempe diskutadi pri ia ajn temo kaj estas li, kiu ĝenerale pli bone regas la hispanan por komerci.

pasinteco kaj eĉ la aŭtentikajn ujĉiajn nomojn, kiujn oni anstataŭigas per bibliaj nomoj. Ade tiuj misiistoj alportas la "Bonan Novaĵon", por kiu ĉia indiĝena kutimo estas malmorala kaj kondamninda.


Oni alfabetigas ilin hispanlingve, kaj ili havas instruiston, kiu instruas la ujĉian lingvon dum du jaroj, sed kiel... "fremdan lingvon"! Alia fakinstruisto trans-

Kaj tiel oni vivaĉas tie, meze de ĝenerala indiferenteco. Jen la situacio de nur du malgrandaj komunumoj — la tuta etno konsistas el proksimume 27 000 homoj.

Mildigi la situacion

La grupo Okayoj [okajoĥ'] ("Amiko" en la ujĉia lingvo), kun kiu kunlaboras i.a. junaj esperantistoj el urbo Kordobo, ĉiujare vojaĝas al tiuj du menciitaj komunumoj por kunloĝi kun la ujĉioj kaj alporti solidaran kunlaboron por iel mildigi ilian situacion. Se vi interesiĝas pri la ujĉiaj komunumoj, bv. kontakti la aŭtoron ĉe C.C. 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. □

51-a Internacia Junulara Kongreso, 31/Jul-07/aŭg.-1995, Sankt-Peterburgo, Rusio. Temo: "Aktivismo: junularo, kiu ne nur dancas".



Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

Patriotaj rusoj

Ĉiam plaĉas konatiĝi kun pensoj kaj opinioj de alilandanoj. Tamen legi la artikolon "Notlibreto pri milito" en *KONTAKTO* 146 (1995:2) ne estigis plezuron. Min timigis la unua frazo "La 9-an de majo 1995 rusoj festos 50 jarojn de la venko en la Granda Patria Milito".

Rusoj, kiuj nomas la Duan Mondmiliton Granda Patria Milito, elmontras havi tre limigitan rigardon. Multaj landoj jam batalis aŭ estis okupitaj, kiam Sovetunio devis partopreni en la milito post neatendita

fino al la alianco kun la agresinto. La komencon de la suferoj priskribas la artikolo. Tial mi ne komprenas, ke oni festas venkon. En milito ne ekzistas venkinto, sed nur perdintoj.

Malĝuste prezenti la karakteron de milito kaj precipe pensi pri venko estas danĝero por la mondopaco. Se tiaj pensoj abundas, la abolicio je deviga militservo kaj la reduktiĝo de la defendaj armeoj en multaj eŭropaj landoj pro la malapero de la plej granda minaco evidente baziĝas sur mistakso.

Ronald Smits, Nederlando

Krucvorta konkurso (Rezulto)

Ni ĝojas anonci, ke la krucvortan konkurson de *KONTAKTO* 145 (1995:1) partoprenis entute 29 homoj el 23 landoj. Lotume venkis **SALVATORE A. MUGLIETT** el Malto. Gratulon al li!

K	O	N	G	R	E	S	A	N	O
A	■	A	R	■	M	A	N	O	■
R	O	Z	A	■	A	T	A	K	■
B	L	O	V	I	■	A	R	T	O
O	■	A	N	N	■	O	■	K	■
■	■	P	■	S	E	■	■	L	A
A	M	A	S	E	■	■	B	A	Z
E	■	N	E	K	■	S	A	V	I
R	O	■	S	T	R	A	T	■	■
O	S	T	O	■	■	T	E	O	■


La edzino de Ĝiĝo

facila

Fernando laboris en oficejo kaj vivis sola en malgranda apartamento*. Li bezonis iun, kiu purigu lian loĝejon. La edzino de Ĝiĝo, kiu tiam klopodis trovi ajnan laboron, volonte akceptis purigi la apartamenton de Fernando.

Sed ŝi ne laboris bone kaj la loĝejo de Fernando plu estis tre polvo*-plena. La polvo tre tusigis* lin. Iun tagon Fernando fariĝis tre kolera kaj skribis mesaĝon* por ŝi sur la polvoplenan spegulon. La mesaĝo diris: "Mi multe tusas por la multa polvo."

Kiam li revenis hejmen en tiu vespero, ankoraŭ ĉio estis tre malpura. La edzino de Ĝiĝo ne estis puriginta la apartamenton, tamen ŝi estis lasinta kuracilon kontraŭ-tusan por la sano de Fernando.



— Elitaligis
Cláudio R. Pistilli,
Brazilo

apartamento: unu el la loĝejoj en granda domo

mesaĝo: informo, kiun oni sendas al alia homo

polvo: aro da er-etoj de seka materialo, kiuj facilege leviĝas en la aero pro vento aŭ movo

tusi: subite brue elspiri

La panjo de la mumintroj

— Franĝo Veuthey



Ĉiu rakonto de Tove Jansson, kiu jam aŭtoris ĉirkaŭ 30 librojn tradukitajn en 30 lingvojn, estas profunda leciono pri libereco kaj komprenemo. "Muminvalo" (2-a eld. Helsinko: EAF, 1993, 18 gid. ĉe UEA), gajnis en la Belartaj Konkursoj de UEA la premion "Infanlibro de la Jaro" en 1993.

Filifjonkinoj, hemuloj, homsoj, knutuloj, mumintroj... ĉu vi konas ilin? Temas pri estaĵoj, elpensitaj bestoj, kiujn kreis Tove Jansson, la "Walt Disney" de Finnlando.

Kvankam Tove, naskiĝinta en 1914, estas konata ĉefe pro mumintroj kaj bildstrioj, ŝi estas principe verkistino. Fakte ŝi gajnis multajn literaturajn premiojn, inter kiuj la medalon Hans Christian Andersen. Tiu ĉi svedlingva finnino, naskiĝinta kiel infano de skulptista patro kaj bildstriista patrino, publikigis siajn unuajn verkojn jam je sia 14-a jaro, kaj ŝia konstanta serĉado de arto portis ŝin poste al Svedio, Germanio, Francio kaj Italio. Knabino Tove pasigis siajn somerojn en la arkipelago Porvoo, sude de Finnlando, kien plenaĝa ŝi revenis por vivi multajn jarojn. Verŝajne en tiuj ventoplenaj insuloj, meze de ŝtorma maro, ŝiaj muminoj "naskiĝis" kaj evoluis.

Ŝiaj kreaĵoj lulis jam milionojn da infanoj en trideko da lingvoj en multaj mondopartoj. Ekzistas televid-serioj, diskoj, libroj, bildstrioj, vestaĵoj kaj multaj aliaj objektoj kun mumintrovaj motivoj. Ŝi komencis desegni la mumintrovajn seriojn por la angla ĵurnalo *EVENING NEWS* en 1953 por financi sian artkarieron. Tio tamen iĝis vera turmento por ŝi — tial ŝi finis sian kontrakton en 1959, post kio transprenis tiun taskon ŝia frato Lars. Nigrablankaj bildstrioj neniel povus kontentigi artiston, por kiu "koloro estas la plej grava afero", laŭ ŝiaj propraj vortoj! Tiam Tove povis reveni al libroverkado kaj al sia unua amo, pentrado.

"Impresionistoj plej influis min", konfesas la artistino, kies monumentaj freskoj ornamas i.a. la Urban Halon de Helsinko kaj la paroĥejon de Teuva. Se vi vizitas Finnlandon, ne forgesu konatiĝi kun la interesega ekspozicio "Muminvalo", kiu konstante sidejas en la Urba Biblioteko de Tampere.

Gaja futbalo

facila

— Teksto kaj fotoj de Maŝa Kočetkova, Rusio

Se vi neniam ludis Gajan Futbalon*, nepre provu! La reguloj tre simplas: partoprenas du teamoj*, sed ĉiun ludanton anstataŭas kvin-opo. Entute rezultas po kelkaj kvinopaj kaj dekpedaj teamoj ĉiu-flanke. La gol*-ejon gardas aŭ unu el la teamoj aŭ neniu; golojn la juĝanto kalkulas kiel en kutima futbalo.



La teamo antaŭ la komencigo de tiu ĉi ludo

futbalo: plej universale konata pilk-sporto; pied-pilko gardi: prizorgi; ĉirkaŭgardi por certigi, ke nenio malbona okazas
golo: jeto de pilko en la celon
teamo: grupo de ludantoj de unu flanko

“Baf, kiom simpla ludo!” – ĉu ne? Sed imagu, ke iu el la kvinopo decidas kuri alidirekten ol la aliaj! Se vi ne volas atenti ĉi tiun okazon, vidu la duan foton. La juĝanto (kiu surfote ne videblas) ĵetis supren la pilkon (kiu surfote ankaŭ ne videblas). Vi opinias, ke ĉiu ludanto rigardas la pilkon, ĉu ne?

Efektive, plejmulto rigardas la pilkon, sed du homoj sentoplene rigardegas la alian teamon. Jen kial estas bone, ke ludanto havu kvin kapojn anstataŭ nur unu!

... Kion? Ke kutima futbalo estas pli interesa? Jes, vi pravas, sed ludi ĉi-maniere estas pli gaje!



Atentante pri la vizaĝ-esprimojn de la ludantoj vi povas facile ekscii, kiu estas la gvidanto de la kvinopo.